

Kiel Louis Pergaud ekvivas la militon en Verdun

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 583/91-2, 1982 majo 13 kaj 15.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-91/SRI-1982-91-2-583-Claude-kaj-Andree-GACOND-Kiel-Louis-Pergaud-ekvivas-la-militon-en-Verdun.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Louis Pergaud, la aŭtoro de la romano LA BUTONMILITO nevole priskribis alian kaj pli seriozan militon, sur kies batalkampoj li pereis. Ĉiutage li skribis al sia edzino restinta en Parizo kaj al parencoj, amikoj kaj kolegoj. Tiuj leteroj formas eksterordinaran atestaĵon pri la spiritstato kaj emocioj de juna franca soldato komence de la unua mondmilito.

A.- La unuajn tagojn senpacienceo kaj arda fervoro vigligis Louis Pergaud. Jen tiurilate simptomaj citaĵoj el leteroj al la edzino:

Cl.- La 7-an de aŭgusto 1914: Mi ricevis novajn vestojn, bonajn ŝuojn, mi atendas nun la momenton de la ekiro. Ĉiutage ni vidas aviadilojn elirantajn el la hangaroj de Verdun kaj ŝvebantajn super niaj kapoj, kaj la tagoj nur malrapide pasas pri tiu senaga milito kaj la manko je sciigoj.

A.- La 9-an de aŭgusto 1914: "Ĉi tie, en Jardinfontaine, la vivo similas al tiu en Chevert, ja monotona. Koncerne la novaĵojn, ili estas tre bonaj, sed estas neeble al ni havi konfirmon. Certa estas tio: mirinda impeto kaj nerezistebla ardo. Ja neeble faligi popolon, kiu tiel ekstaras por defendi sin, kiam ĝi estas animita de tiel bela fervoro."

Cl.- La 10-an de aŭgusto 1914: "Mi ricevis hieraŭ viajn leterojn de lundo kaj mardo, kaj vi ne povas imagi, kiel ĉi tio min trankviligis, Belege: mia edzineto estas tre kuraĝa kaj brava ! Kaj mi tre fieras. Ne zorgu, karulino mia, mi ja revenos, iom brunigita, iom tanita, sed pli rezistokapabla... Ĉiu kiel eble plej bone aranĝas sin; kaj mi nutras la plej firman esperon je la estonta venko.

A.- La 11-an de aŭgusto 1914: "La trupoj de Belfort, enirintaj en Mulhouse, kredeble suferis pli ol ni, kaj mi maltrankvile demandas min, kio fariĝis el Lucien, Joseph kaj Maurice dum la terura buĉado sangiginta la tutan Alzacan ebenaĵon.

Cl.- Lucien, Joseph kaj Maurice estas la frato, bofrato kaj kuzo de Louis Pergaud, mobilizitaj en la infanteriaj regimentoj de Belfort kaj Besançon.

A.- "Nu! ni ne pensu pri tio, kaj ni esperu, ke ilia bona stelo ŝirmis ilin kontraŭ la ŝrapneloj kaj kugloj. Regas terura varmego, la ĉielo estas profunde blua, kaj la ĉirkaŭaĵo verda kiel nia espero.

Cl.- Oni sentas, ke Louis Pergaud provas mildigi la timojn de sia edzino. Jen citaĵo el letero de la 13-a de aŭgusto 1914: "Ĉiutage alvenas vunditoj, sed ĝenerale ne gravaj estas la vundoj, ĉar iliaj pafaĵoj, ŝrapneloj, estas multe malpli murdaj ol niaj. Eĉ se trafita, vidu, restas al ni ebleco eltiriĝi. Nu do, trankviliĝu, ĉar nuntempe mi nenion riskas, kaj estonte ne multe. Mi cetere fidus je mia stelo.

A.- Tiu letero de la 18-a de aŭgusto montras, kiel kreskanta batalemo animis la soldatojn: "Nun la granda batalo verŝajne komenciĝis, kaj mia regimento, kiu, se la Germanoj estus sukcesintaj la antaŭplanitan subitan atakon, estus kredeble la unua por ricevi la batojn,

troviĝas pro la sinsekvo de la eventoj malantaŭ la agado, kio malfruigas la momenton, kiam "ni eniros en la karieron".

Cl.- Verŝajna aludo al la franca himno Marsejlezo.

A.- "Kiam la aliaj jam ne enestos, venos nia vico, kaj supozeble la afero estos malpli akuta ol en la komenco, ĉar la malamikoj estos jam iom seniluziigintaj kaj elĉerpitaj. Ĉi tiu batalo estos verŝajne unika en la analoj, kaj mi ne volus en ĝi ne partopreni. Mi plej forte fidus je mia stelo. Alfronti la pafadon ja ne estas tiel terure. Mi vidis kamaradojn, kiuj de tie revenis: al ili ŝajnis, ke ili nenion alian faris ol dum tempo de manovroj. Kaj finfine la ĉi-tiea vivado, kun la elĉerpaj ĉiutagaj deĵoraĵoj kaj la streĉa atendado estas kredeble malpli agrabla ol tiu pasigita en tranĉeoj aŭ antaŭpostenoj.

Cl.- Kaj tiu letero de la 24-a de aŭgusto raportas pri la venĝema kresko: "Kiaj fikanajloj, kiaj banditoj! En la vilaĝoj antaŭ ni, kiujn ni sukcesis reakiri, ili ĉion bruligis, pendumis la junulojn 16-17-jarajn, strangolis virinojn; onidire ili deŝiris la mamon de juna patrino, kiun ili volis devigi propramane mortigi sian infanon. Ja estas komprenebla la kolerego kaj furiozo de tiuj, kiuj de proksime povis ĉeesti tiajn kruelegajn agojn kaj kiel estos malfacile al niaj ĉefoj admoni ilin je humanecaj sentoj kontraŭ la venkitoj...

A.- La sekvaj leteroj raportas pri laciĝo. Kuraĝon fortikigas la ideo, ke la malamiko ne eltenos longe. La 31-an de aŭgusto 1914 Louis Pergaud tiel kuraĝigas sian edzinon: "Ne estu malgaja, kara mia, ni ne estas malfeliĉaj, kaj mi ja esperas vin revidi. Se la disiĝo estos pli longdaŭra ol oni unue supozis, ne gravas, ĉefafero, antaŭ ĉio savi Francujon, kaj neniu, mi estas certa, delasos sian devon. Ĉiu gajnita tago akriĝas la malamikan malfacilan staton.

Cl.- La 24-an de septembro Louis Pergaud tiel priskribas la situacion en letero al amiko: "Mi ne imagas, kion devas elteni la kamaradoj tie antaŭe, sed la vivo ja ne estas agrabla por tiuj, kiuj staras malantaŭe kaj atendas sian vicon. Malgraŭ ĉio, malgraŭ ĉiaj bonvoloj, estas malfacile elteni la pezajn laborojn trudatajn al la ĉi tie starantaj viroj. Kiom da polvo kaj mikroboj ni glutas! Kaj la noktoj, dum kiuj ni malŝarĝas la trajnojn plenajn je kripligitoj, vunditoj kaj malsanuloj. Kaj la krevantaj ĉevaloj kaj ĉiuj malbelaĵoj, ĉiuj egoismoj, sed ankaŭ ĉiuj sindonoj kaj ĉiuj heroaĵoj. Jen io neforgesebla. Jam de tridek ses horoj mi ne dormis. Sed kio estas tio, kompare al tiuj kiuj restadis 4 tagojn en tranĉeoj, kun la piedoj en akvo, atendante la ŝtalan hajladon. La senton pri 1' danĝero oni facile ne plu havas, mi kredas: ia bonfara fatalismo kaptas nin, kaj ni iras, kien ajn la sorto nin pelos. Kiel ajn, ni suspektas, ke la forto, kiun ŝajne disvolvas la germana armeo, prezentas nun nur ne pli ol birdtimigilo. Ĝi estas la argilpieda koloso, kiu ĵus diluiĝis sub la pluvo, kaj diseriĝos tuj ĉe la unua grava alfronto.

A.- En la vera milito, same kiel en la butonmilito, ĉiu kampo persistas por konservi kuraĝon en la kultivado de la sento, ke la alia kampo estas malpli forta kaj baldaŭ perdonta. Neniam Louis Pergaud imagas, ke ankaŭ la malamikoj travivas samajn turmentojn. Pri artilerianoj, kiuj perdis la kuraĝon kaj sen batali forlasis siajn kanonojn kaj estis pro tio mortkondamnitaj, li diras:

Cl.- "Juste. Necese. Malmilda neceso, sed kiel eblas alie! Francujo antaŭ ĉio."

A.- La venontan semajnon, ĉiam per citaĵoj el leteroj de Louis Pergaud, ni travivos kun li la ekvivon sur la antaŭaj vicoj kaj en la tranĉeoj de la batalkampo de Verdun.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*